



Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, la 8-an de Januaro 2024

Ĉeestantoj (zome): Jehoŝua Tilleman, Dror Gaon, Mikaelo Lineckij, Inbar Mor, Ŝlomo Ŝaĥar, Eran Yuval-Vodevoz, Amri Wandel, Gabi Zeevi.

Protokolo de la pasinta kunsido estis sendita al la estraranoj kaj baldaŭ enretigota.

1. Raportoj

Jehoŝua sendis la lastan IE-176, per la poŝtoŝeĉejo de Kirjat-Mockin. La israela pakaĵo kostis ĉ. 580 NIS, la eksterlanda – ĉ. 735 NIS (plus la taksia transporto – ĉ. 90 NIS).

2. Tasko-dividoj en la Estraro (Jehoŝua)

Jehoŝua (prezidanto, ĉefdelegito de UEA), **Mikaelo** (vicprezidanto, redaktoro de IE, kulturaj aferoj), **Amri** (eksteraj rilatoj, komitatatano A por Israelo, Israela Kongreso), **Ŝlomo** (kasisto, financ-aferoj), **Gabi** (protokoloj), **Dror** (retejo de ELI, interreto), **Eran** (konsultanto pri financaj aferoj), **Avigail** (kontaktoj kun la membroj, poŝtkolektado), **Inbar** (junularo).

3. Luigo de la Oficejo (Amri)

Amri: ekde Januaro 2024 ni devos pagi 1,368 siklojn – kion ĝis nun pagis la luanto. Ni petis la administranton Bar Vardi helpi al ni denove luigi, sed li havas multajn vakajn ejojn en la etaĝo. Post konsulto kun Ŝlomo **Amri** aperigis anoncon en Yad2 (pri 1,600 NIS per monata pago – modeste por tia loko), kontraŭ ĉ. 1,700 NIS por 3 monatoj. Estis ĝis nun 5 interesigantoj telefone, sed ili ne revenis.. Ekzistas ankaŭ alia ebla kanalo, **Madlan**, malpli vizitata, kontraŭ 400 NIS monate. Ĉu anonci ankaŭ tie? **Voĉdono: akceptite!**

4. La Israela Kongreso – Aprilo 2024 (Jehoŝua, Amri)

Amri rezervis lokon por anonci sur la dorsa paĝo de **Esperanto** kontraŭ 165 eŭroj. Ĝi havos ligilon al nia retpaĝo kun la detaloj troveblaj tie. 3 eksterlandanoj jam certas ankaŭ por la Antaŭkongreso, 2 aliaj pripensos. 15 ĉambroj estas rezervitaj (per kreditkarto de Amri), dulita ĉambro kostas 340 NIS por unu nokto kun matenmanĝo. La programkosto estos 150 NIS por israela partoprenanto, duono (70 NIS) por la neesperantista kunulo/kunulino.

AK: koston ĉ. 400 eŭrojn, inkluzivos ĉion, escepte vespermanĝojn. Ĝi daŭros 4 tagojn, ekde lundo, la 8-a de Aprilo; vizitoj en Cezareo, Akko, Hajfa, Nazareto, Tiberiado, Morta Maro kaj Jerusalemo. Necesas mendi jam nun 5 ĉambrojn en Hajfa! (**Jehoŝua**).

5. Riparo en la Dratverejo (Amri)

Amri: la luanto plendis pri la lumo, kiu eniras frumatene tra la ŝutro en la dormoĉambro. **Jehoŝua:** ĝuste antaŭ du jaroj ni riparis(!) – kaj post multekosta oferto ĝi fine kostis 400 siklojn. **Amri** priskribos ĉi tion letere al Lior Hass: ni traktis la aferon en la Estraro, malkovrante ke ni jam riparis foje, kaj nun ni petos nemultekostan oferton por la riparo.

2/...



6. Subvencio por niaj membroj en UEA (Jehoŝua)

Jehoŝua: niaj membroj, kiuj membras en UEA laŭ kategorio MB (Membro Baza), ricevadis subvencion de 35 NIS el la kaso de ELI dum la lastaj jaroj. Anstataŭ pagi 27 EUR (proks. 105 NIS), ili pagadis nur 70 NIS. Intertempe la kurzo de la eŭro altiĝis, kaj la nuna pago devos esti 110 NIS. Ĉu ni altigu nian subvencion per 5 sikloj, aŭ ĉiu membro pagu ekde nun 75 siklojn por UEA. **Decido:** ekde Januaro 2024 niaj membroj pagu po 75 siklojn por la MB en UEA, kaj nia subvencio restos 35-sikla.

La venonta kunsido: lunde, la 5-an de Februaro 2024, je la 20:00

Protokolis: Gabi Zeevi